

TEA-BULTENO

15A JARO NOVEMBRO - DECEMBRO 2012 NUMEROJ 11-12

Rideto estas la plej mallonga distanco inter du homoj.
Victor Børge Rosenbaum, dana muzikisto (1909-2000)

Al la Tea-anaro

Jes, mi scias, mi legas viajn enmensajn pensojn: "Nun ŝi proponos al ni la kutiman, gurditan 'muzikon'! Kion oni faris, kion oni ne faris, kial vi ne vizitis la asocion, kial vi ne kunlaboris kiam estis bezonate, kial vi ne varbas, kial vi ĉiam krokodilas, kial vi ne legas la bultenon ...: nu, la kutimajn plendojn jarfinajn! Nenio nova sub la ĉielo! Pli bone transsalti ŝiajn enkondukajn vortojn! Eble tra la tuta bulteno mi sukcesos trovi ion pli interesan!"

Nu, ne timu, ĉifoje mi estas kompatema al vi: en ĉi krizaj momentoj, kiam tro seriozaj, ĉiutagaj problemoj turmentas onin, mi pli milde vin traktos. Pri asociaj faritaĵoj vi estos detale informitaj dum la jara asembleo, pri ĉiumonataj okazontaĵoj kaj pri novaĵoj vi ekscios pere de la bulteno, kaj eĉ sen ĝi, ĉar interrete ĉio troveblas, eĉ la dato de mia naskiĝtago, okaze ke vi deziru ion belan donaci al mi! Do, for la ŝercojn kaj ni serioze interparolu! Ĉi tri-folia bulteno, kiun vi estas tenanta en viaj manoj (se vi ne jam ĝin forĵetis aŭ uzis por envolvi pomoŝelojn, antaŭ ol tiujn enrubaĵujigi!), estas la lasta kiun vi ricevos (ne tro entuziasme ĝojsaltu, ne la definitive lasta, nur la lasta en tiu ĉi jaro!). Alia jaro rapidege alproksimiĝas, baldaŭ el la nuna restos nur la memoro pri la plej diversaj eventoj, ĉu memorindaj ĉu malmemorindaj, kiujn oni travivis dum la pasintaj 365 tagoj. Mi varme esperas, ke malgraŭ ĉio la 2012-a jaro estis kompleza al vi ĉiuj.

Kiel promesite, mi ne listigos tion, kio estis farita de TEA dumjare, nur invitas vin varme al partopreno de la aranĝoj kiuj okazos en novembro kaj decembro: sufiĉas tralegi la programojn lastpaĝe. Do, pasigu bone ĉi du lastajn jar-monatojn kaj iom antaŭtempe, bonan jarfinon kaj plej sukcesan kaj senprobleman 2013-an jaron! *Via Elda*

Karaj legantoj, la supraj vortoj de nia ĝenerala segretario estas kiel kutime pensigaj kaj emociigaj. Kondiĉe ke oni legu ilin atenteme, de la unua vorto ĝis la lasta.

La lastaj vortoj cetere, estas tre gravaj. Malofte — aŭ eble neniam — en nia programo estis listigitaj tiom da diversaj eroj en la monatoj novembro-decembro. Mi povus diri, ke oni havos pli da programoj ol da TEA-partoprenantoj.

Ni tuj komencas per KARSTAJ TAGOJ 2012: ekskursoj, "osmiza", vizito al Oliv-muelilo, gustumado de Karsta lunĉo, muzika programo "Prikantante mian Trieston", enkadre de la projekto "La patrina lingvo: je la radikoj de identiĝo" kaj.. kaj… eble ankoraŭ io alia. Sekvas tre ĉarma spektaklo "Mi rakontas al vi la Karston" kaj, en decembro, ekspozicio pri kristnaskaj desegnaĵoj. Al tio aldoniĝas la kutimaj sidejaj programeroj.

Pardonu … kion vi volas pli ol tio???

Ja vi devus vin demandi pri la prizorgantoj/ prizorgontoj de ĉio ĉi, sed mi demandas min, ĉu iu TEA-ano partoprenos tiujn aranĝojn, ĉu iu kunlaboros en la preparado de ĉio necesa, por ke la afero plensukcesu. Ĉar pri plena sukceso mi tute ne dubas, kvankam iaj demando-punktoj stariĝis.

Optimismo abundas en nia TEA, tiom ke ni alfrontos la defiojn de 2013 gaje kaj laboreme.

Baldaŭ ni turnos la lastan kalendaran folion kaj troviĝos de unu minuto al la alia plene en 2013 kaj devos pristudi kaj funde ekzameni la rezultojn de 2012. Verŝajne la rezultoj ne estos imponaj, oni travivas nefacilajn momentojn en la tuta mondo, ekonomia krizo kaj kunligitaj problemoj sufokas ĉiujn kaj sekve ankaŭ nian asocion. Sed ni daŭrigas nian vojon, kiel diktis nia Majstro:


Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
nek batoj de l' sorto, nek mokoj de l' homoj,
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.

L' espero, l'obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –
ni semas kaj semas konstante.

Mi ŝatus, ke vi ĉiuj subskribu tiujn vortojn, kiuj estas la kerno de nia engaĝiĝo por la internacia lingvo Esperanto laŭ la idealoj de nia Ludoviko.



Intertempe, vi ja povas anonci vin por kontribui en la realigado de ĉi lastaj programeroj. Mi atendas vin je la 3a etaĝo de *via del Coroneo* 15, en la sidejo de Triesta Esperanto-Asocio.

Edvige

Triesta Esperanto-Asocio lanĉas Konkurson dulingvan pri Pentrado, kun titolo: Premio "Angelo Soranzo" - Jaro 2013

Regularo

Art. 1 Senpaga estas la partopreno. Je libera temo, la konkurso akceptas kiun ajn teknikon, inkluzive de "glulaborajĵoj" kaj "mozaiko". Ĉiu verko devas enteni tekston, de almenaŭ unu vorto, dulingvan: en esperanto (skribita en verda koloro) kaj en unu el la lingvoj de Eŭropa Unio (skribita en alia ajna koloro). Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per pentraĵo kun maksimumaj dimensioj: 80x80 cm, inkluzive de kadro.

Art. 2 Sur la verka malantaŭo devas esti la aŭtoraj donitaĵoj kaj la titolo, en kiu ajn lingvo. Krome, ĝi estu provizita per taŭgaj iloj por simpla alkroĉado surmura.

Art. 3 Art-Komisiono, alcele elektita, distribuos la jenajn premiojn:

1-a premio - € 300
2-a premio - € 150
3-a premio - € 50

Ĉiu partoprenanto ricevos de Triesta Esperanto-Asocio partopren-diplomon.

Art. 4 TEA retenos la 3 premiitajn verkojn kaj havos pri ili plenan reprodukt-rajton.

Art. 5 Enskribiĝo kaj transdono de la pentraĵoj okazos, **en 2013**, ĉe sidejo de TEA (via del Coroneo 15, 34133 Trieste) en koncernaj vendredaj tagoj de la marta, aprila, maja, junia kaj septembra monatoj, ekde la 19-a horo ĝis la 20-a k 30.

Art. 6 La ekspozicio de la konkursontaj verkoj okazos ĉe TEA-sidejo, aŭ en aliaj ejoj ankoraŭ difinendaj, en **novembro 2013**.

Art. 7 La premio-disdonado okazos la **15-an de decembro 2013**, ĉe la TEA-sidejo.

Art. 8 La nepremiitaj verkoj estos je dispono de la aŭtoroj en la **vendredoj de januaro 2014**, de la 19-a horo ĝis la 20-a k 30. Se ĝis la 24-a de januaro 2014 oni ne reprenis sian pentraĵon, tiu iĝos posedaĵo de TEA, kun ties reprodukt-rajto.

Art. 9 La juĝo de la elekta komisiono estas neapelaciebla kaj nekontestebla.

La Organiza Komitato, kvankam garantiante ordinaran gardadon de la transdonitaj verkoj, tamen ne respondecas pri ŝteloj kaj/aŭ domaĝoj eventuale okazontaj.

La partopreno en la konkurso antaŭvidas la senrezervajn konon kaj akcepton de la regularo, plus la plenigadon de la enskribiĝilo.

Art. 10 Konforme al la leĝo n. 196/03 pri gardado de personaj donitaĵoj, oni certigas, ke ĉiujn ricevitajn datenojn oni prikonsideros per la pleja diskreteco kaj, en ĉiu momento, la aŭtoro rajtos peti ilian ĝisdatigon, kontrolon aŭ forviŝon.

Art. 11 La Asocio tenas por si la rajton, akcepti aŭ malakcepti la partoprenon de la prezentotaj konkursaĵoj.

Por ĉiu ajn informo kaj por ricevi la konkursajn regularon kaj partoprenilon, bonvolu kontakti la organizanton. Bonvolu disvastigi ĉi konkurson!

Triesta Esperanto-Asocio
Tel: 331 - 4805706
esperantotrieste@yahoo.it
nored@tiscali.it, testudo.ts@gmail.com

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Kion ĉifoje vi malkovros pri Triesto? Nu, respondu al tiuj ĉi demandoj kaj konatiĝu kun homoj, lokaj dirmanieroj kaj kuriozaĵoj pri tiu ĉi multfaceta urbo, kaj - espereble - ion novan vi ekscios.

Kaj nun, ek al labor'!

1) Kiu estis kaj pro kiuj grandfaroj estas konata Emilio Comici [Emiljo Kòmiĉi], naskiĝinta en Trieste en 1901, kiu tragike malaperis nur 39-jara?
2) Kiel oni pretigas *Kaiserfleisch*-on (Imperiestra viando), kiu estas tipa triesta plado Habsburg-devena?
3) Kion signifas la triestdialekta termino *petesseria*?
4) Kia la deveno de la vorto *osmize*, tiuj tre viziataj portempaj vinvendejoj, troviĝantaj en la domoj de la vitkulturistoj?

Respondojn vi trovos je paĝo 5-a.

Cerbotiklilo de Viglo



Nia kara amiko pli kaj pli cerbumadas por trovi ion cerbumiga por vi. Fakte li ofte diras: "Ĝis kiam oni ekzercade funkciigas la cerbajn neŭronojn, tiuj plue kaj longatempe faros sian laboron. Sed, per kio ekzerciĝadi? Unu el la multaj, eĉ tre amuzaj, manieroj estas klopodi solvi miajn cerbotiklilojn!" Tre saĝa estas li, do, dankon al Viglo, pro lia plej lasta elpensaĵo!

Kiu el la sekvaj kvin multiplikoj enŝteliĝis, rompante logikan kriterion?

a) 35 x 22
b) 45 x 12
c) 66 x 9
d) 73 x 8
e) 24 x 19

Solvo en la venonta numero de Tea-Bulteno. Eble estos premio por kiu plej rapide havigos la korektan solvon al la redakcio!

HUMPHREY TONKIN EN LA 37-A MALFERMA TAGO - Centra Oficejo de UEA - Rotterdam

Sabaton, la 24-an de novembro, estos unu el la lastaj aranĝoj de la ĉi-jara festado de la 125-jariĝo de Esperanto. La ĉefprelegantо estos prof. Humphrey Tonkin, kiu parolos pri la temo *125 jaroj: Esperanto tiam kaj nun*. Krome li traktos, sub la temo *Traduko kaj originalo en la Esperanto-literaturo*, la nocion ke Esperanto-literaturo estas en si mem tradukita literaturo - en la senco, ke ĉiu literatura verko en Esperanto estas iasence manifestiĝo de la kultura kaj lingva fono de la verkinto. Interesegaj prelegoj, ĉu ne? Kiu iros???

Nuntempe la vorto "krizo" ĉie furoras dum paroladoj, inter homoj kiel ĉe televido, en kiuj ofte "junularo" ĉefrolas: tiuj junuloj, "pufinfanegoj" (itale, 'bamboccioni'), kiuj ne volas eliri el gepatra hejmo, for de sia patrino, sen iniciatemo, sen estonteco … … Tio memorigis al mi du fabelojn, kiujn la imagpovo de Gianni Rodari – fama kaj ege kapabla itala verkisto por infanaro – sugestis al li.

Jen la unua; se al vi plaĉas, kune ĝoju pri tiaj etaj bongustaĵoj. Kaj, spite al "krizo", eta rideto surlipiĝos al vi. Espereble. VIGLO

LA VOJO KONDUKANTA NENIEN de Gianni Rodari*

Tri vojoj dividiĝis ĝuste elireje de la vilaĝo: la unua direktiĝis al la maro, la dua urben kaj la tria kondukis ... nenien.

Tion ĉi Martino sciis, ĉar daŭre li demandis ĉiujn, kaj ĉiuj same respondis:

– *Tiu vojo? Ĝi kondukas nenien. Ne utilas paŝi laŭ ĝi.*

– Kaj, ĝis kie ĝi iras?

– *Nenien ĝi iras*.

– Sed, do, pro kio oni ĝin konstruis?

– *Neniu ĝin konstruis, ĉiam ĝi estis tie*.

– Sed, ĉu neniu ĝin laŭpaŝis por vidi?

– *Ci estas ja tute malmolkapulo: se ni certigas cin, ke tie nenio estas vidinda ...*

– Tion vi ne povas scii, se tie neniam vi estis.

Tiel obstine li kondutis, ke oni komencis alnomi lin Martino Malmolkapa, sed pro tio li tute ne ĉagreniĝis, daŭre pensadis pri tiu vojo ... nenien kondukanta.

Kiam li iĝis sufiĉe kreska, por trairi straton sen doni sian manon al la avo, iun matenon li fruvekiĝis, eliris el la vilaĝo kaj senhezite ekmarŝis sur la mistera vojo, kaj de tiam, ĉiam pluen kaj pluen. La tuta strata surfaco estis truoplena kaj per herbaĉoj invadita, sed bonŝance jam delonge ne pluvis, tiel ke flakoj ne estis.

Dekstre kaj maldekstre flankis herbobarilo, sed baldaŭe arbaro ekaperis. Arbobranĉoj plektiĝantaj super la vojo estigis malluman kaj malvarman tunelon, kiun, nur tie kaj tie ĉi, kelkaj sunradioj tralumis por iomete prilumi ĝin.

Paŝo post paŝo, neniam finiĝis la tunelo, neniam finiĝis la vojo, la piedoj ekdoloris Martinon, kiu komencis eĉ pensi, ĉu ne estus plibone reveni, kiam abrupte li ekvidis hundon.

«Kie estas hundo, tie staras domo – rezonis Martino – aŭ almenaŭ homo». La vostoskuanta hundo kuris renkonten al li kaj eklekis liajn manojn, poste ĝi turniĝis, ekiris la vojon, ĉiupaŝe retrorigardante, por kontroli, ĉu Martino estis ankoraŭ lin sekvanta.

– Mi venas, mi venas, – diris Martino, kun scivolemo. Finfine la arbaro iom post iom maldensiĝis, supre denove la ĉielo aperis kaj sursojle de fera kradpordo la vojo finiĝis. Tra la stangoj Martino vidis kastelon kun pordoj kaj fenestroj larĝe malfermitaj, el ĉiuj kamensuproj fumo eliradis kaj de balkono ege bela sinjorino permane salutis lin kaj gaje alkriis:

– Venu, venu, Martino Malmolkapa!

– Ho, – ekĝojis Martino – mi ne sciis, ke mi estus alveninta, sed ŝi jes.

Li puŝis la kradpordon kaj eniris la salonon de la kastelo, ĝustatempe por reverenci la belan sinjorinon, suben venantan laŭ ŝtuparego. Ŝi estis bela, vestita eĉ plibone ol feinoj kaj princinoj, krome ŝi estis ja gaje ridanta:

– Nun venu: mi vizitigos al ci la kastelon.

Ĉeestis en ĝi pli ol cent salonegoj, plenplenaj je ĉiuspecaj trezoroj, samkiel en tiuj fabelaj kasteloj, kie ripozas la belaj dormantinoj aŭ kie ogroj amasigas siajn riĉaĵojn. Li vidis diamantojn, juvelŝtonojn, oron, arĝenton, kaj ĉiumomente la bela sinjorino estis diranta:

– Prenu, prenu kion ci deziras. Al ci pruntos mi ĉareton por forporti la ŝarĝon. Do, ci ne kredis.

– Kion?

– La historion de la vojo kondukanta nenien.

– Tro stulta ĝi estis. Kaj ekzistas pli da lokoj, ol da vojoj, laŭ mi.

– Tutcerte, sufiĉas deziri moviĝadi.

Pensu ja, ĉu Martino bezonis pliajn insistpetojn. La ĉareto estis plenŝarĝita, kiam li forveturis. Surkeste sidis la hundo, dresita hundo, kiu tre firme tenis la bridojn kaj ekbojis al la ĉevaloj, kiam tiuj estis dormetantaj kaj devojiĝintaj.

Kun mirego Martino Malmolkapa estis akceptita en la vilaĝo, kie jam oni timis lin mortinta. Li, malavare, disdonis donacojn al ĉiuj, amikoj kaj malamikoj, centfoje devis rakonti sian aventuron, kaj ĉiufoje, je la fino, estis iu kiu kuregis hejmen, prenis ĉareton kaj ĉevalon, kaj impete ĵetiĝis sur la vojon kondukantan nenien.

Sed, samvespere, ĉiu el ili revenis, unu post la alia, bedaŭrmiene: por ili, la vojo finiĝis en la arbaro, kontraŭ densa arbobarajo, en maro da dornoj: kradpordo, kastelo, bela sinjorino ne plu ekzistis.

Ĉar kelkaj trezoroj ekzistas nur por la unua laŭiranta novan vojon, kaj ĉiokaze la unua ja estis Martino Malmolkapa.

* * * * * * * * * * * ** * * * * * * * * * * *

***Gianni Rodari** (Omegna, la 23-an de aŭgusto 1920 – Roma, la 14-an de aprilo 1980), pedagogo kaj ĵurnalisto, kontribuis al renovigo de la infana literaturo per nombraj verkoj, en kiuj klare percepteblas lia vigle inteligenta sentemo kaj natura komikeco. Li konstante priatentis la rilaton inter plenkreskulo kaj infano, avangarde enkondukis en siajn rakontojn seriozajn kaj gravajn vivotemojn, sed en maniero malpeza kaj amuza. Li anstataŭis, per superrealaj rolantoj kaj situacioj, la tradician sorĉan fabelaron. Lia pedagogia ĉefverko, eseo adresita al gepatroj kaj al kiuj laboras kun kaj por infanoj, estas la "Gramatiko pri Fantazio: enkonduko en la arton elpensi rakontojn".



Rodari estas, ĝis nun, la ununura itala verkisto, ricevinta la premion "Hans Christian Andersen" (1970), la plej prestiĝan agnoskon por verkistoj de infanlibroj.

PLIOFTAJ PARONIMOJ

*Jen la **lasta listo** sendita de nia amiko VIGLO (por ĉi tiu jaro)!*
Ĉu li disponas pri ia neelĉerpebla puto?

Kornedo ĉapvesto de iaj monaĥinoj
Korneto speco de trumpeto

Korneo membrano de okulglobo
Korno surkapa osta elstaraĵo de hufuloj

Kornico ornama elstaraĵo kronanta konstruaĵojn ks
Korniko *(Zo)* sp. *(Corvus corone)* de korvo

Korono ekstera parto de la suna atmosfero
Krono cirkla florkunplektaĵo, signo de merito aŭ gloro; cirkla surkapa ornamaĵo, signo de suvereneco

Korpo ĉe homo k bestoj, aro de la materiaj organoj
Korpuso plej ampleksa parto de armeo; kolekto de tekstoj

Kotorno ŝuo de antikvaj tragediaj aktoroj
Koturno birdogenro el la ordo de galinoformaj

Krabo nomo de la dekpiedaj markrustacoj
Krabro granda specio de vespo

Kraĉi elĵeti salivon el la buŝo
Kraki eligi sekan bruon

Kramfo muskola spasmo
Krampo fera fiksilo en ĉarpentaĵoj aŭ masonaĵoj; skriba k tipografia signo

Kredo mensa konsento pri religiaj aŭ filozofiaj opinioj
Kreto mara sedimenta kalkŝtono; skribilo por nigra tabulo

Krenelo entranĉaĵo ĉe supro de fortikaĵa muro
Kreno herbo kultivata por radiko, uzata kiel kondimento

Krescento figuro havanta formon de lunarko
Kresĉendo iom-post-ioma plilaŭtigo en muziko

Krespo faruna pastaĵo fritita en pato
Kresto karneca elkreskaĵo aŭ plumtufo kreskanta surkape de kelkaj birdoj
Krusto ekstera malmola parto de bakaĵo

Kreteno malspritulo, stultegulo
Kretono teksaĵo el lino, kanabo aŭ kotono

Kropo flanka poŝo de la ezofago ĉe birdoj
Krupo gorĝmalsano

Kruciĝi transverse sin renkonti (pp vojoj aŭ objektoj)
Krucumi ekzekuti pendumante sur krucon

Kruco T-forma pendumilo; simbolo de la kristana religio
Kruĉo vazo por likvoj

Kruda ne preparita, natura; ne mildigita
Kruta forte klinita deklivo

Kuko franda bakaĵo
Kukolo genro de birdoj nestparazitaj

Kukumo *(Bo)* s. de kukumiso *(Kukumis sativus)* cilindroforma k akvoplena
Kurkumo *(Bo)* g. *(Curcuma)* el zingibracoj

Kulio hinda aŭ ĉina laboristo
Kulo malgranda insekto sangosuĉanta

Kulmino supro; ekstremeco
Kulmo tigo de gramineoj

Kupeo apartigita parto de veturilo
Kupo vitra kloŝeto, medicinilo por altiri la sangon

Kurso lecionaro; vojlinio
Kurzo prezo de akcioj, devizo

Laco eluzo de fortoj pro troa penado
Laĉo ŝnureto el kotono, silko, ledo
Lazo ŝnuro por kapti brutojn, bestojn

Lado maldika plato el metalo
Lato longa lignopeco uzata en konstruado
Latuno alojo el kupro k zinko, flavkolora

Lago etendaĵo da akvo, limigita de tero
Lako guma rezino el arboj, uzata en meblofarado
Lakeo servisto ĉe riĉuloj, portanta livreon

Lakto blanka likvo produktata de inaj mamuloj cela al nutrado de idoj
Laktuko herbogenro kultivata kiel salatplanto
Laktumo semo de masklaj fiŝoj

Lama malfacile paŝanta pro kripleco de kruro
Lamao altranga budhisma instruisto
Lamo *(Zo)* g. *(Lama)* de senĝibaj remaĉantaj mamuloj, vivantaj en Sud-Ameriko

Lango organo en la buŝo
Lingvo interkomprenigilo

Lano ŝafhararo
Lanugo malpeza plumaro; delikata hararo ks

Latero flanko, en geometria figuro
Latiro *(Bo)* g. *(Lathyrus* el fabacoj) de unu- aŭ plur-jaraj herboj

Legomo ĉiu manĝebla ĝardena herbo
Legumo guŝo
Legumino proteino troviĝanta en la semoj de fabacoj

Legaco parto de heredaĵo, donita per testamento aŭ kodicilo al iu
Legacio diplomatia misio

Leki ŝovi la langon sur ion
Liki tralasi likvon; ellasi elektran kurenton

Lenso disko el vitro, plasto aŭ kristalo, deviganta la lumradiojn
Lento *(Bo)* g. *(Lens culinaris)* de mediteranea kulturplanto
Lentugo haŭtmakulo; efelido

Leontodo *(Bo)* sp. de taraksako
Leontodono *(Bo)* g. *(Leontodon* el asteracoj) de plurjaraj laktosukohavaj herboj
Leontopodo *(Bo)* g. (*Leontopodium* el asteracoj) de plurjaraj herboj; ĉ. 60 sp-oj el montaroj de Eŭropo k Azio; alpa leontopodo → edelvejso

Ringoforma kuko kun pomoj kaj jogurto

Jen por vi simpla, dolĉa recepto, facile farebla: vi agrable surprizos viajn karulojn, kiuj, post ties frandado, superŝutos vin per senfinaj laŭdoj kaj dankoj. Estu certa!

Ingrediencoj

300 g	da faruno
2 ujetoj	125-gramaj da jogurto
150 g	da sukero
80 ml	da olivoleo
4	ovoj
3	ruĝaj pomoj
1	citrono
2 kuleretoj	da gistopulvoro
1 kulero	da butero
200-300 g	da aprikota marmelado

Preparado

Lavu du pomojn, ilin kvaronigu, deprenu la internan kernon, senŝeligu kaj kubetigu ilin.

Rompu la 4 ovojn en ujo, aldonu la sukeron kaj kirlu la tuton per elektra batmiksilo, ĝis ekestos ŝaŭma kremo.

Aldonu, iom post iom, la farunon, ĉiam miksante per la batilo je modera rapideco, por eviti grumelojn.

Enmetu la oleon kaj jogurtojn, la raspitan citronan ŝelon kaj gistopulvoron, kaj daŭre ĉion miksu ĝis ricevi kremecan kunmiksaĵon. Je ĉi punkto aldonu la poman kubetaron.

Buterumu kaj farunumu la ringoforman kukujon, enverŝu la preparitaĵon, glatigu la surfacon kaj enmetu en fornon, jam antaŭe varmigitan je 180°, dum 30 minutoj.

Kiam preta, elfornigu kaj lasu ĝin malvarmiĝi: poste ĝin renversu sur larĝan pladon. Lavu la trian pomon, ĝin kvaronigu, deprenu la kernon kaj ĉiun poman kvaronon ankoraŭ onigu, forme de duonlunetoj. Surŝprucu tiujn onojn per citron-suko kaj ilin metu ĉirkaŭ la kuko.

Metu la marmeladon en bovleton kiun vi lokigos en la centron de la ringo: finfine ĉio pretas, surtabligu kaj ... bonan apetiton!

IPA kaj Esperanto

En 1949, en la ĵurnalo "*Police Review*" (Polica Revuo) aperis artikolo de iu persono, subskribinta per la kaŝnomo *Aytee*, per kiu li informis, ke li starigis rilatojn kun kolegoj el multaj landoj pro laborkialoj, kaj ke tiuj kontaktoj transformiĝis en aŭtentikajn amikecajn ligojn. Substrekante kiom gravas, je profesia kaj homa niveloj, similaj rilatoj, li sugestis, ke aliaj kolegoj sekvu tiun ekzemplon kaj ke, en estonteco, oni komencu pensi pri starigo de internacia asocio kunliganta ĉiujn policanojn el la tuta mondo.

Tiu ideo estis tiom pozitive prijuĝata, ke, post mallonge, en januaro 1950 estis fondita la Brita Polica Sekcio kaj - kiel unua sekretario - estis elektita polica funkciulo de la brita provinco Lincolnshire, Arthur Tropp, nome ĝuste tiu s-ro *Aytee*, la artikolskribinto. Informo pri la iniciato rapide disvastiĝis kaj en pluraj landoj formiĝis samspecaj sekcioj.

En septembro 1955, dum la unua internacia kongreso de diversnaciaj sekcioj, okazinta en Parizo, estis fondita la Internacia Polica Asocio (IPA). Arthur Tropp, kiel unua, proponis, kiel devizon, frazon en la angla lingvo, sed poste li ŝanĝis opinion kaj pensis, ke oni devus utiligi alian lingvon. Li prikonsideris la francan, poste la germanan, italan, hispanan kaj latinan, sed fine li decidis kontaktiĝi kun Bob Hamilton, IPA-membro el Glasgow, Skotlando, kiu estis esperantisto. Kaj al tiu, antaŭ la kongreso, li estis petinta tradukon de la origine anglalingva devizo "Service Through Friendship" al Esperanto, kaj dum la ĝenerala kongresa kunsido li proponis la konatan frazon: "Servo per Amikeco". Post pluraj proaj kaj malproaj diskutadoj, fine oni ĝin akceptis kaj ekde tiam ĝi aperas en la ŝildo de la Internacia Polica Asocio.



Ĉijare la Israela IPA-Sekcio festas sian fond-datrevenon, kaj por celebri tiun eventon, oni eldonis poŝtmarkojn kun suba talono, sur kiu aperas ankaŭ la skribo "Servo per Amikeco". Nepre akirenda de esperantistoj-filatelistoj!

Respondoj al la demandoj pri Trieste:

1) Li estis rokgrimpisto kaj speleologo. Li suprengrimpis multajn montojn de la Orientaj Alpoj, malfermante ĉirkaŭ ducent novajn vojojn. Inter la 30-aj k 40-aj jaroj de pasinta jarcento, li distingiĝis en la "sesa grado", en tiu tempo konsiderata la limo home nesuperebla, laŭ la skalo Welzenbach pri malfacilaĵoj en la grimpado.
2) *Kaiserfleisch* estas fumaĵita porka lumbaĵo, kiu aĉeteblas ĉe triestaj porkaĵvendejoj. Oni devas ĝin kuiri en malmulto da bolanta, sensala, akvo dum ĉirkaŭ 15 minutoj. Poste oni surŝutu la elkuiritan viandon per raspita kreno kaj servu ĝin kun acida brasiko, aparte kuirita.
3) La eldiro devenas el la franca *pâtisserie*, kukvendejo, sed ankaŭ likvorvendejo, do el tio venis *petesseria*, vintrinkejo. Sekve *petèss* havas signifon de tre forta alkoholaĵo, kaj *petessèr*, de kiu malmodere kaj troe trinkas.
4) Tiu nomo venas el la slava lingvo, el la orda numeralo oka (*osm*), ĉar ok-taga estis la tempodaŭro dum kiu estis permesite vendi lokajn k tipajn produktaĵojn, en la farmoj kaj keloj de la kamparanoj. *Osmize* estas tipaj en la karsta altebenaĵo de Triesto. Ŝajnas, ke tiu kutimo eĉ ekzistis jam en la epoko de Karlo la Granda, kiam Istrio kaj Triesto estis forlasitaj de Bizancio kaj iĝis parto de la franka regno. Ordono de Karlo rajtigis ĉiujn vitkulturistojn de la Imperio rekte vendi la vinon, kondiĉe ke oni signu tiun eblon per elmontro de arbobranĉo ĉe la vojo kondukanta al la kelo. Post kelkaj jarcentoj tial, ke jam delonge estis enradikiĝinta tiu kutimo, per dekreto Jozefo la dua de Habsburgo, en 1784, preskribis, ke al ĉiu agrikulturisto estu donita la permeso vendi neenboteligitan vinon, dum ok tagoj. Sed ne nur vinon, sed ankaŭ ĉion alian memproduktitan, kiel ovojn, ŝinkon, salamojn, kolbasojn kaj fromaĝojn. Ankoraŭ nuntempe la karstaj kamparanoj malfermas siajn kelojn kaj bonvenigas la triestanojn, kiuj certe ne maltrafas tiun ĉi okazon trinki bonan vinon kaj frandi naturajn bongustaĵojn.

Novembra Programo

1 ĵaŭdo	9h00 - en placo de la Urbodomo de Aurisina: ekskurso laŭ la Vojo de l' Salvio
2 vendredo	18h00 - Osmiza en aŭtuno - Vinkelo Parovel - Bagnoli della Rosandra
3 sabato	10h30 - apud Gastejo Al Stacidomo, post la ponto sur rivereto Ospo - ekskurso al lagetoj de Noghere kaj Muggia
4 dimanĉo	10h00 - Olivmuelejo Parovel, San Dorligo della Valle
6 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj 19h00 - Ni festu nian Viglon!!!
9 vendredo	20h00 - La Dia Komedio, komparo inter la esperanta kaj triesta tekstoj
10 sabato	17h00 - Teatro Beethoven Inaŭguro de ekspozicio kaj koncerto por la 150-a datreveno de Harmoniko *Ploner*
12 lundo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: 9 minutojn kun...
13 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
16 vendredo	20h00 - Preparlaboroj por la spektaklo de la 17a de novembro
17 sabato	18h00 - Teatro Beethoven PRIKANTANTE MIAN TRIESTON - spektaklo, triestadialekte, de Alessio Colautti kaj aliaj artistoj
20 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
23 vendredo	20h00 - Vojaĝo tra Armenio, filmo de Edvige
27 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
30 vendredo	18h00 - Teatro Beethoven MI RAKONTAS AL VI LA KARSTON - prezentado de Alessio Colautti

Decembra Programo

4 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
7 vendredo	Muntado de ekspozicio pri Kristnasko ĉe la Jubilea Salono, Orientgreka Komunumo, Via Mazzini 3
De la 8-a ĝis la 16-a	Ekspozicio de Kristnaskaj desegnaĵoj ĉe la Jubilea Salono Inaŭguro: la 8-an; horo decidenda
11 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
12 merkredo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Trarigardo de la TEA-agado dum 2012-a jaro
14 vendredo	20h00 - Zamenhofa Festo: Rememorante nian Majstron
18 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
28 vendredo	20h00 - Adiaŭ, 2012ª jaro!

Karstaj Tagoj - Aŭtuno 2012

El la vasta programo, planita por loka kaj neloka esperantistaro kaj subtenita de la Triesta Provinco, jen kelkaj interesaj eroj:

Ĵaŭdo 1-a de novembro:

De maro al montoj: de mituloj al *teran*-vino
Por ekscii iom pli pri la geografia lokiĝo de Karsto, la geologio kaj la karakterizoj de ĉi grundo: kiel ili influas la agrikulturon, la lokajn produktaĵojn kaj la vin-gastronomion. Itinero laŭ la Vojo de l' Salvio (*Aurisina*).

Vendredo la 2-a de novembro

***Osmiza* en aŭtuno** - gustumado de nova vino kaj de lokaj karstaj produktoj en *Bagnoli della Rosandra*, ĉe la Vinkelo PAROVEL

Sabato la 3-a de novembro

Ekskurso **al la 7 lagetoj de *Noghere***, tre interesa natura loko, kie kunvivas pluraj, flaŭraj k faŭnaj, specioj, aŭtoktonaj kaj ne. Poste vizito de Muggia.

Dimanĉo la 4-a de novembro

Olivmuelejo Parovel... "Kies oleo vi estas?"
Prezentado de la olivmuelado, dum kiu la ebriiga parfumo kaj la freŝa gusto de la nova oleo vin allogos kaj tentos al multaj gustumadoj de la diversaj oliv-oleoj produktitaj de Parovel.

Sed Karstaj Tagoj ne finiĝas: en la unuaj tagoj de decembro, ni proponas al vi aliajn du interesajn promenadojn en Karsto.

Sabato la 1-a de decembro
Laŭ la Pado Naturo: de *Prosecco* al *Santa Croce*

Dimanĉo la 2-a de decembro
De *Repen* al Monto *Lanaro*

Ni estas je dispono por ĉiaj aliaj bezonataj detaloj. Ne hezitu kontakti nin, persone, telefone, rete!

Edvige: 040 350093 - nored@tiscali.it

Elda - 040 398562 - testudo.ts@gmail.com



Plej Serenan Kristnaskon kaj Pacan 2013ª Jaron al TEA-anoj kaj Legantaro deziras Triesta Esperanto-Asocio

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina - www.esperantotrieste.it
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349